

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2011:3 (maj-jun)

American Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2011:3 (May-Jun)

La plej *ŜOKA*
filmo de nia tempo!

Pratempa fieco revenas
por infekti la homaron...

...sur la LUNO!

ATAKO DE LA LUNAJ ZOMBIOJ



Vi
NENIAM
ekdormos
denove!

Ĉi-numere:

- Tradukdefio de Vladimir NABOKOV
- Video classes
- Pluraj pluraloj problemdonaj
- Revenas krucvortenigmo
- Kaj multe pli!

Ĉu pli bona ol *Incubus*? Internacia grupo de volontuloj dublas novan horrorfilmon (pĝ. 5)

Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin

Vol 50, No 3 — 2011:3 (maj–jun)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (*American Esperantist*) is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your email/postal address, and a closeup photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.



Usona Esperantisto estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, (ret)poŝtadreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajna republikigita materialo. Opinioj esprimataj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.



**esperanto
usa**

Centra Oficejo • Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER

Sekretario • Secretary: Steve BREWER

Kasisto • Treasurer: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • Other board members: George

BAKER, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, ROS Haruo, Tor

KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING,

Julie WINBERG

Korespondi deziras

53-jara finno, invalido, sola fraŭlo serĉas bonajn koramikojn 36-45-jaraĝajn kun familioj kiuj studas aŭ instruas Esperanton, la anglan, la hispanan aŭ la italan lingvojn. Inter miaj interesoj estas muziko kaj muzik-kulturo, ĉiuspeca kolektado (ekz. bildkartoj, monbiletoj, fremdlingvaj gazetoj, sondiskoj), legado, biciklado, naĝado, promenado.

Tapani LAPPALAINEN, Hauralantie 48, FIN-37500 Lempäälä, FINLAND

Skribu al Usona Esperantisto!



Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri materialo iam aperinta en UE. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, 400. Sendu viajn mesaĝojn al:

bulteno@esperanto-usa.org

Ŝerco: nomoj

Arestitoj post liberiĝo babiladas pri la vivo en la malliberejo.

- Ĉu ankaŭ ĉe vi ĉiu portis sur la vesto numeron anstataŭ nomo?
- Jes. Mi portis sur la brusto numeron 4777.
- Ĉu bruste? Kion vi havis sur la dorso?
- 4778.
- Ĉu ne la saman? Kial?
- Tiu estis mia karesnomo.

*Enesperantigis László HUSZÁR;
Sendis Vilĝo HARRIS*

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly bulletin *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

In the member list, don't publish my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Card verification #: _____ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

Veterana esperantisto en Walla Walla

Raportas Ellen EDDY

WALLA WALLA, VAŝINGTONIO — Homoj ofte ŝercas pri la nomo de la urbo Walla Walla en sudorienta Vaŝingtonio.

Sed al la indiĝenoj la nomo estis tute sencohava. En ilia lingvo, *wana* signifas “rivero” kaj *wana wana* signifas “rivereto”. Nu, se la esploristo nur povus pli bone aŭdi, ni nun nomus la urbon Wana Wana. Sed kiel ofte okazas, kiam oni aŭdas nekutiman vorton, oni ofte misprononcas ĝin, rezulte Walla Walla – la urbo kiun oni tiom amis ke oni nomis ĝin dufoje.

Sed gravas tiu urbo ĉar tie loĝas longtempa, dediĉita esperantisto, Sara Ann ESTLING. Komence de la 70-aj jaroj, kiam ŝi kaj Al ESTLING geedziĝis, Esperanto iĝis grava parto de ŝia vivo. Ili ofte starigis kursojn por lokanoj kaj partoprenis en la multaj E-agadoj en la regiono. Mi renkontis la paron en la 80-aj jaroj kiam mi loĝis en Richland nur 50 mejlojn for. Mi ofte iris al Walla Walla por partopreni E-grupojn aŭ nur por viziti kaj babili Esperante. Sara Ann multe kuraĝigis min kaj iĝis bona amikino. Ŝi havas belan animon kaj ĉiam rigardas la mondon en pozitiva maniero. Ni ofte vojaĝis kune kaj dividis multajn memorindajn Esperantajn spertojn.

Antaŭ kelkaj jaroj kiam ŝi devis translokiĝi al malgranda apartamento, ŝi donacis multajn E-librojn al la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kaj aliaj taŭgaj Esperanto-grupoj. Dum mia lasta vizito en Majo, ŝi donis aliajn vortarojn por NASK. Interese al mi estas ke ŝi

retenis la jenajn: la *Plena Ilustrita Vortaro*, *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* de Benson, *Esperanto-English Dictionary* kaj *Step by Step in Esperanto* de Montagu BUTLER kaj *Esperanto-English Dictionary* de J. C. WELLS. Ili estas la samaj libroj kiujn mi havas apud mia labortablo kaj komputilo.

Post 88 jaroj, ŝiaj okuloj komencis malhelpi ŝin legi, sed eĉ se ŝi ne povas bone vidi, ŝi ankoraŭ daŭre lernas per helpo de speciala pligrandigilo. Sara Ann ne povas facile partopreni Esperantajn aferojn nun, sed plaĉas al ŝi havi kontaktojn kun la multaj longtempaj geamikoj kiujn ŝi renkontis dum la jaroj per Esperanto. La telefono estas la plej bona maniero kontakti ŝin. [*La telefonnumero de Sara Ann aperos en la venonta Membrolisto; oni ankaŭ povas peti ĝin de Ellen per <eddyellen@aol.com>.* —Red.]



Nun eĉ eksterteraj zombioj parolas Esperanton

En aŭgusto de 2010 Mar CARDENAS ricevis mesaĝon kiu enkondukas s-ron Christopher R. MIHM el Minesoto, sendependa kreanto de filmoj pri hororo kaj scienc-fikcio. Li prilaboris novan filmon, kiu nomiĝas *Attack of the Moon Zombies* (“Atako de la Lunaj Zombioj”)

Li havis du modestajn demandojn:


Unue, ĉu ni bonvolus kontroli lian tradukon de *Peace through Science*, kio aperos en la emblemo de la uniformoj por la filmo.

Due, ĉu ni konsentus traduki la tutan filmon en Esperanton? Temas pri Esperanta lingvotrako por la nova filmo. Ĉar la kostoj de liaj filmoj estas pagataj de la arduloj pri la filmoj, li povos kompensi nin nur per la feliĉo de la kunlaboro, kaj la espero, ke nia kunlaborado gajnos favoran renomon por lia grupo kaj por Esperanto.

Al ambaŭ demandoj Mar jesis iom senhezite. “Kiam mi donis jesan respondon al la unua ret-mesaĝo de Kris”, ŝi diris, “mi tute ne sciis ĉu mi havus eĉ unu helpanton! Oni povas diri ke ĝi estis ‘fid-salto.’”

La filmoj de Christopher R. MIHM estas en la stilo de la 1950-a jardeko, uzante la teknikojn kaj supozojn de tiu tempo. Lia nuna filmo situas en internacia luna bazo en la fora estonto. Fakte, 1976, laŭ la optimista vidpunkto de la 1950-aj jaroj. Kaj optimistoj de tiu epoko nature supozus uzon de la internacia lingvo de paco por kunlaborado. Pro tio li ekhavis la ideon uzi Esperanton en la uniformoj de la aktoroj kaj en la scenajoj.

Do li sendis al Mar manuskripton de 60 paĝoj kaj 800 linioj da dialogo. Per sia



George BAKER

Georgo estas estrarano de E-USA kiu helpis traduki kaj organizi dubladon de la filmo. Li loĝas en Emeryville, CA.

gbakisto@yahoo.com

mesaĝisto “Grupo Amikema” ŝi ekis varbi kunlaborantojn. Iuj respondis por korekti la emblemon, iom malpli por la traduklaboro. Mar rakontas,

Kelkaj Esperantistoj ofertis helpon kaj mi sendis al ili paĝon da teksto por traduki, sed de ili mi neniam ricevis tradukitan tekston. Tio iom seniluziigis min.

Kelkfoje mi maltrankviliĝis de estontaj kritikoj pri traduk-eraroj, venantaj de tiuj al kiuj mi petis helpon sen ricevi ĝin. Tamen, mi daŭre laboris.

Certe la tradukado postulas laboron kaj tempon, kaj oni povas komenci kun bonkora intenco por poste heziti antaŭ la defio.

Tamen, eĉ per necertaj paŝoj la laboro iris ĉiam antaŭen. Por ĉiu demisio alvenis nova volontulo. Ni ĉiuj ricevis niajn tekstojn kaj resendis la verkaĵojn al Mar.

Bonŝance, kelkaj bonkoraj esperantistoj multe apogis la traduk-projekton.

Georgo BAKER provlegis ĉies laboron kaj mi finpretigis la tradukitan dokumenton por Kris.

Mar eĉ verkis gvidilon por la prononco de Esperanto, kaj sondosierojn de sia

voĉo kiel ekzemplo de la Esperanta parolmaniero. Estis en decembro kiam ni sendis ĉion al la reĝisoro kaj elspiris kontente.

Surprize en la mezo de Februaro ni ricevis la peton, ke ni ankaŭ voĉaktoru por la Esperanta sontrako. La afero estis, ke mankas tempo por trejni la geaktorojn en la prononco de Esperanto. Li bezonas registri ĉion antaŭ la komenco de Aprilo por presi la DVD-ojn. Ĉu ni povus helpi?

Mar kaj mi diskutis, kaj ĉar ŝi ne havas en Sandiego grandan grupon de esperantistoj, mi supozis, ke la laboro de dublado estu bazita en Sanfrancisko. Mi ne ekpensis, ke ni diru “ne”, kaj neniam dubis pri ŝia senlaca subteno.

Kiam Georgo interesiĝis pri sonbendigo de la tekstoj mi certis ke li frenezigiĝis. Kie li trovas tiom da voĉaktoroj? Laŭ mi tiu tasko estas eĉ pli malfacila ol simple traduki tekstojn!

Tamen, li sukcesis! Li ne nur trovis voĉaktorojn sed nun la projekto estas sufiĉe fama en Esperantujo kaj multe da samideanoj antaŭĝojas spekti la filmon kiam ĝi estos finfine publikigita!

Certe la sukceso ne estas mia, sed de ĉiu, kiu senlace helpis min. Por ĉiu manko iu aperis ĝustatempe por plenumi ĝin. Se iu ajn en nia grupo ne farus sian taskon ni eble ne sukcesus en la disponebla tempo. Estis la bonkoreco kaj sindediĉo de ĉiuj, kio kreis la rezulton.

Niaj ĉefaj voĉaktoroj estis Duncan CHARTERS, Miko SLOPER, Jennifer BON-

DELID, kaj Mar CARDENAS, kiuj surŝultrigis la plej defiajn rolojn kun po 130 ĝis 200 linioj. Ankaŭ notinda estas Max VARAZSLO, kiu kreis en Esperanto kentukian parolmanieron por la originala piloto en la filmo.

Aliaj voĉaktoroj estas Enrique ELLEMBERG, Stephen SCHWICHOW, George BAKER, Lucille HARMON, Gregory TSEYTIM, Derek ROFF, David RUTAN, Yumiko FUJII, Masaaki TAHARA kaj Brandon SOWERS.

Tradukintoj estis George BAKER, Mar CARDENAS, David RUTAN kaj Andrea MONTICUE. Redaktintoj por la Esperantaj sondosieroj estas George BAKER kaj Enrique ELLEMBERG.

Gravan dankmencion meritas Enrique ELLEMBERG, kiu elserĉis kaj klare priskribis rimedojn kaj metodojn por registrado kaj redaktado de la sondosieroj. Eĉ tiuj el ni, kiuj ne havis sperton en tiu laboro sukcesis fari sian rolon. Nia laboro progresis malgraŭ tio, ke ni estis en malsamaj regionoj, eĉ landoj, kaj ne havis la komunan tempon por labori kune.

En la vortoj de Mar,

Mi estas tute surprizita pri nia bela projekto, pri la alta nombro de sindediĉaj homoj kiuj kontribuis al ĝi. Mi ege dankas ĉiujn kiuj daŭre apogis la projekton!

Do, *Attack of the Moon Zombies* estas finita kaj sendita por presi. En Minneapoliso oni pretigas la gajan mondebuto de la filmo en la 25-a de majo.



Pluraj pluraloj problemdonaj

Pluraloj en Esperanto ĝenerale estas sufiĉe facile uzablaj, sed kelkaj ja kaŭzas al la esperantistaro malfacilaĵojn. Mi suspektas, ke multaj el ni estis surprizitaj kiam ni eksciis, ke *Ŝi havas longajn harojn* estas la ĝusta maniero traduki *She has long hair*. Ĉi-sube, mi rimarkigos al vi kelkajn aliajn pluralojn kiuj estas ofte misuzataj.

En la angla, oni uzas la pluralon *pants* por nomi unu veston. Oni agas simile ankaŭ en aliaj lingvoj: ekzemple, en la hispana oni nomas la veston *pantalones*. Pro tiu alilingva kutimo, multaj homoj nomas la veston *pantalonoj* en Esperanto. Tio tamen estas eraro: la vorton *pantalonoj* oni uzas nur kiam efektive temas pri pli ol unu vesto. Ordinare, do, oni diru ekzemple *Mi portas pantalonon* anstataŭ *Mi portas pantalonojn* (krom se vi ial portas almenaŭ du pantalonojn samtempe).

Kontraste al *pantalonoj*, la vorto *okulvitroj* estas uzata pli malpli same kiel la ekvivalenta vorto en la angla: *paro da okulvitroj* estas unu objekto konsistanta el



Steven CYBULSKI

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

stcybulski@gmail.com

du kunfiksitaĵoj. Plej ofte, nur la vorto *okulvitroj* estas bezonata: *Li portas okulvitrojn, Ŝiaj okulvitroj estas novaj*, kaj aliaj similaj frazoj estas tute bonaj. La pli longaj esprimoj *paro da okulvitroj kaj paroj da okulvitroj* estas utilaj kiam oni volas emfazi, ke temas pri nur unu objekto aŭ pli ol unu objekto: *Mi havas unu paron da okulvitroj; Estas du paroj da okulvitroj sur la tablo*.

La vorton *ferio* oni kutime tradukas al *vacation* aŭ *holiday*. Tiuj tradukoj estas ĝustaj, sed ekzistas erariga diferenco inter la signifoj de tiuj vortoj kaj la signifo de *ferio*. *Vacation* kaj *holiday* povas daŭri tagojn, semajnojn, aŭ eĉ pli longe. *Ferio*, tamen, daŭras nur unu tagon. Plurajn tagojn, dum kiuj oni ne estas devigata labori, oni nomas *ferioj*. ★

Lunaj zombioj (de pĝ. 6)

Pro la senpagitaj laboroj de multaj ĝenerale normalaj homoj naskiĝis nova ret-rostila scienc-fikcia filmo por stari apud la klasikaj filmoj de la 1950-a jardeko, kiel *The Thing* kaj *Attack of the Crab Monsters*.

Kion ni pensu pri Chris MIHM kaj la aro de aktoroj, laborantoj, monkontribuantoj, admirantoj, kaj nun esperantistoj, kiuj laboras senpage por krei ion feliĉigan, amuzan, eĉ belan per pro-

praj manoj, mensoj, kaj koroj? Ĉu oni povus diri, ke la mesaĝon de Mihm estas, ke la espero kaj optimismo ne eksmo-diĝis; ke purkora laboro beligas la vivon; ke feliĉiga sensencaĵo povas esti la plej profunda saĝo? ★

Por ekscii pli pri la filmo, kaj spekti antaŭ-filmon en Esperanto, vidu:

- <http://sainteuphoria.com/aotmz.html>
- <http://www.youtube.com/watch?v=ep6KxLWtZKg>

Diversaj elangloj de la nabokova prozaĵo

Por tiu ĉi traduk-defio ni elektis prozaĵon verkitan de rusa/usona verkisto Vladimir NABOKOV:

The kind of Russian family to which I belonged—a kind now extinct—had, among other virtues, a traditional leaning toward the comfortable products of Anglo-Saxon civilization. Pears' Soap, tar-black when dry, topaz-like when held to the light between wet fingers, took care of one's morning bath... "We could not improve the cream, so we improved the tube," said the English toothpaste. At breakfast, Golden Syrup imported from London would entwine with its glowing coils the revolving spoon from which enough of it had slithered onto a piece of Russian bread and butter. All sorts of snug, mellow things came in a steady procession from the English Shop on Nevski Avenue: fruitcakes, smelling salts, playing cards, picture puzzles, striped blazers, talcum-white tennis balls."

—el *My English Education* (1967)

La-defio vekis viglan intereson... dan-kojn al DR, EBS, SM, DS, SL, kaj RW kiuj sendis tradukaĵojn. Ni esperas ke aliaj homoj kiuj ne sendis provon tamen pensis pri la teksto kaj trovis ĝin interesa kaj analizinda.

Frapis nin ke ĉiu en la unua frazo elektis la verbon *aparteni*. Ne nur tio, sed ĉiu uzis la frazon *al kiu mi apartenis/as*. La vorto estas taŭga en tiu ĉi kunteksto, sed malofte ni vidis tian unuecon pri vortelekto. Ĉu estas aliaj manieroj esprimi la ideon de *belonging* en familio? Kio pri *en kiu mi naskiĝis, en kiu mi pasi-*



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko ni prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ni faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Pro okupiteco de la aŭtoroj, ni provizore ĉesigas aperigon de la rubriko. Ĉu vi volas, ke ĝi revenu? Sendu al ni vian opinionon:

bulteno@esperanto-usa.org

gis miajn fruajn jarojn, aŭ en kiu mi edukiĝis? Ĉu tiaj frazoj kaptas la saman sencon? Por parolantoj de la angla, estas emo forgesi pri la internaj trajtoj de Esperanto kaj sekvi la anglan strukturon. Tial ni pensas ĉi tie pri la sufikso *-an...* Ekzemple, *Mi estis familiano en tiaspeca rusa familio...* aŭ *Tia rusa familio, de kiu mi estis ano...* Ĉu pli bone, aŭ ne?

Homoj donis diversajn strukturojn al la unua frazo. Jen:

La speco de rusa familio al kiu mi apartenis – speco nun formortinta –

Tia rusdevena familio al kiu mi apartenas – ĉitia ne plu ekzistanta –

Tia kia rusa familio al kiu mi apartenas – tiuspeca nun elviviĝanta –

La speco de rusa familio al kiu mi apartenis –speco nun jam forpasinta –

La ruslanda familitipo al kiu mi apartenis – tipo nun forpasinta –

Tia rusa familio al kiu mi apartenis – speco ne plu ekzistanta –

Estas pripensinde, la elekto inter *speco* kaj *tipo*. Ĉi tie ni taksas la uzon de *speco* pli bona ol *tipo*. Indas kontroli la difinojn. Laŭ PIV2005:

tip/o 1 Ideala modelo, prezentanta alta-grade en si la karakterizajn ecojn de iu speco de personoj aŭ objektoj. **2** Tuto de la karakterizaj trajtoj de iu grupo; ĝenerala formo, ĉirkaŭ kiu oscilas la variaĵoj.

spec/o 1 Aro da estaĵoj aŭ objektoj, havantaj komunajn karakterizajn ecojn.

2 Persono aŭ objekto kiun oni ne povas precize difini, kaj kiun oni montras nomante ian similanon.

Ĉar angle oni emas uzi la vortojn *kind* kaj *type* sinonime, estas facile uzi ilin simile en Esperanto, sed la distingo estas sufiĉe grava. Certe oni povus argumenti por unu aŭ la alia, sed laŭ ni la teksto de Nabokov parolas pri *speco*, ne *tipo*.

Tamen, plaĉas al ni la elekto de *tia/kia* en tiu ĉi frazo. Efektive estus plaĉe iom modifi unu el la supraj frazoj al *Tia rusa familio al kiu mi apartenis – kia ne plu ekzistas*.

Pri **comfortable products** estis interese vidi la diversajn ideojn. *Komfortigaj produktoj, konvenaj produktaĵoj, komfortaj fabrikaĵoj, komfortigaj varoj, allogaj produktoj, komfortaj produktoj*. Tre plaĉas al ni la elekto de *voroj*.

Ne estas necese igigi la radikon *komfort-*. Seĝo aŭ domo povas esti komforta, tial *komfortaj varoj* estas tre trafa esprimo. *Varo* estas “objekto, fabrikita por

vendado; artiklo de komerco” kaj ĝuste pri tiaj aferoj skribas la verkisto.

Pear’s Soap. Jen marko, aŭ varnomo. Iu skribis *Pears sapo* – atentu, ke tia formo ne eblas en Esperanto. Oni povas skribi *Pears-sapo*, sed pli bone *la sapo Pears*. Kelkaj elektis *sapo de Piro* sed laŭ ni, malĝuste. *Pear’s* ĉi tie estas nomo, ne frukto. Ĝi estas sapo farita kaj vendita de Andrew PEARS unue en 1789. Efektive la vera varo nomiĝas *Pears Soap*, sen apostrofo, malgraŭ la teksto de la verkisto. (La sapo ankoraŭ haveblas; vidu la retejon: <<http://pearsinternational.com>> ...kaj jen la vara vero!)

took care of one’s morning bath. Ĉi tie homoj ŝajne iom hezitis. *Taŭgis por la matenobano, dum matena banado, traktis la matenan banon, estis ĉe la matena bano, sufiĉis por onia matena bano*. Hmm. Neniu vere kontentigas. Kio pri *Per la sapo Pears oni kontentige (aŭ bonefike, aŭ eĉ plaĉe) banis sin ĉiumatene?*

Golden Syrup. Ankaŭ tio estas varnomo, do prefere ĝi restu kiel eble plej senŝanĝa. Iu elektis *la siropo “Golden”*, kiu ŝajnas esti plej taŭga.

entwist with its glowing coils. Ĉiu elektis malsaman aliron al tiu ĉi frazo. Ni trovas:

implikis per siaj lumaj bukloj

vindigis lumajn cirkletojn

enplektis per siaj lumetantaj volvaĵoj

ĉirkaŭtordinta kun ĝia dislumantaj vo[l]vrisortoj

brile orspiralanta

ĉirkaŭvolvis per la oraj spiraloj

Kvankam *ora* ne egalas al *glowing*, ĝi ial ŝajnas trafa. Kaj *entwist* kaj *coils* povas priskribi serpenton – ĉu *serpentumis ore*?

snug and mellow. Nabokov ĉi tie uzas malkutimajn priskribojn por la aĉetitaj varoj. Oni ne ofte petas la edzon/edzinon iri al la vendejo por io “snug and mellow.” La vortoj kreas impreson de komforto kaj hejmeco, sed samtempe, iel sufokan, kaj eble malnovepokan. Oni elektis *komfortaj mildaj, hejmaj allogaj, gemutaj* [!] *komfortaĵoj, dorlotkomfortaj*, ktp. *Gemuta* estas unu el la raraj germandevenaj balastaj vortoj en PIV – plej ofte tiaj vortoj en PIV estas francdevenaj. Laŭ difino, ĝi taŭgas por la traduko, sed ĝi estas tiom malofta vorto, ke eble ne indas uzi ĝin.

fruitcakes. Kelkaj elektis la formon *fruktukokoj*, kiu estas apenaŭ elparolebla. Prefere oni enlasu vokalon, do *fruktoku-*

koj. Kvankam la teksto ne estas laŭtleigata, la belsoneco kaj flueco de la frazoj grave rolas por glata legado.

picture puzzles. Laŭ PIV 2005, *puzlo* estas “ludo, konsistanta el dissplitigitaj eroj, kiujn oni reordigu por rekonstrui bildon aŭ formon.” *Bildoenigmo* estas tro svaga, kaj ne necesas inventi novan vorton kiel *kunmetendaĵoj*. *Puzlo* tute bone rolas ĉi tie.

Jen la deka rubriko en nia serio. Ni faros paŭzon nun pro novaj devoj de la aŭtoroj. Ni volas forte danki al ĉiuj kiuj interesiĝis kaj partoprenis la diversajn defiojn. Estiĝis multaj peninstigaj kaj viglaj diskutoj pro la kontribuadoj de ĉiuj. Ni konsilas ke vi daŭre traduku – kaj se vi kreos bonan tekston, proponu ĝin al la redaktisto de UE!

Amike, Tim kaj Lee ★

Senintencaj esperantaĵoj?



Dankon al fotintoj Dominic LAFLAMME kaj Chris ZERVIC.

Video classes

One evening most weeks, some Esperanto speakers here in the Research Triangle area of North Carolina get together for dinner and face-to-face conversation. The most frequent participants come from Raleigh, Durham, Chapel Hill... and Santa Fe.

It might seem impractical for someone in New Mexico to be a regular at a meeting in North Carolina, but former Raleigh resident Bruce Sherwood is with us most weeks, often showing us photos of his travels or a book he's reading or something interesting on his computer. He also joined us at a regional meeting one Saturday to watch Esperanto-related video clips. But he's not actually with us in person. We see and hear him, and he sees and hears us, via the Internet.

Back in the mid-1980s, Duke University built a video classroom (conveniently a few steps from my office, in fact) that was part of a network of similar classrooms at other nearby universities. A lecturer in any of these classrooms could be seen from the others on a large projected television image. The video was one-way, but there were microphones in all the classrooms, permitting students to ask questions and, to a limited degree, engage in discussions.

Today we can do all this and more from our offices and homes for far less than the impressive sum Duke spent to create and operate that classroom. In fact, our weekly conversations between Durham and Santa Fe cost us nothing be-



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgarygrady@frontier.com

yond equipment and services already paid for.

Many computers, especially laptops, come with everything you need to make video calls already built-in, though you might want to add a better microphone, a better camera or a larger screen. Built-in or added on, you'll need, besides the computer:

- A camera. If you don't already have one or you want to get something better, you can find decent quality "webcams" for sale even in some drugstores, and many video camcorders can be used as well. You'll need to tell your computer which camera to use, a choice made either in the calling program itself or with your computer's System Preferences (Mac) or Settings (Windows).
- Either a headset or else a microphone and speakers. Note that with the latter you can encounter problems with feedback, though in our experience the Skype software does an excellent job of filtering it out. The problem doesn't exist at all with a headset, but that's harder to use if you have several people participating on one side of the conversation. Again, you'll probably

need to tell the computer which microphone to use if there's already one built in.

- A computer screen. Surely you have one of those! But if several people are looking at the same screen, you may want a bigger one. Don't overlook the fact that you can connect most computers to a high definition television set using an HDMI cable and a fairly inexpensive adapter. (The exact adapter you'll need depends on your computer.) Incidentally, no matter what the salesman tells you, you don't need to spend \$100 for a "premium" HDMI cable. Anything labeled as "high speed" or "340 MHz" will produce the maximum quality with any currently available video source. A "better" cable can no more enhance a digital picture than it can a movie's plot.

You'll also need a broadband Internet connection, preferably at least 768 kilobits per second in each direction, though I've made do with less. Unfortunately there are still a lot of places in the U. S. that are limited to dial-up, and if you're in that situation, all I can say is that high-speed is coming eventually.

Finally, you need a video conferencing program. The most popular seems to be Skype, which is available for Mac OS X, Windows, as well as some smart phones and the Apple iOS devices like the iPad and iPod Touch. At present Skype charges nothing for two-way Internet video calls. If you want to involve more than two computers in the same call you

can (up to six, I believe, at present), provided at least one party to the conversation is a subscriber to Skype's premium video service. (See <http://skype.com> for details.) There are other video conferencing services as well, and I don't mean to slight them. Skype just happens to be what I'm most familiar with.

So much for the technology. What can you actually do with it? Here are just some ideas:

- A teacher in one location can work with a group of students in another, even on another continent.
- A class can be entirely virtual, with each student in a separate location.
- An isolated student can take part in a class far from home without the need to travel.
- Two classes in different places, ideally in different countries with different national languages, can connect to practice conversation and gain experience hearing different accents.

It's important to note that the practical number of separate locations for a truly interactive class is limited by practical concerns. For one thing, only so many video images can fit onto the same screen. Skype suggests limiting calls to five locations: your own plus four others (so your screen shows four simultaneous video pictures). Skype also imposes an absolute upper limit of 10 simultaneous connections (with the screen divided into nine parts), and it would be difficult to work with more than that anyway.

Note that if one of the locations has more than a few persons present, it can be hard to make out individual faces in a wide view of the crowd. In that case it makes sense to use a separate, movable camera (perhaps on a tripod) or even a couple of cameras with software to switch between them. Camtwist, Manycam and Webcamplus (for Windows) permit you to do that and more, such as superimpose text.

In general, for most language classes, the smaller the number of students the better. One exception is a Cseh-method course, which employs group response. That group response is more practical for large classes, and it helps beginners develop confidence because they aren't put on the spot to respond individually.

In fact, there are other video services, such as UStream, that allow you to set up what amounts to your own television station, broadcasting from one location to an unlimited number of Internet viewers. Some services also allow you to switch between originating locations, so you can conceivably have instructors in two different locations—like a television program with hosts in different cities. It's also possible for viewers to make comments or ask questions via text message or voice connections as in the Duke video classroom, except that UStream allows the possibility of a far larger potential audience.

If you want to try teaching a course this way, I strongly suggest keeping it small and simple at first. Do trial runs with some friends before your first "live" class. Make sure you've selected the right

camera and microphone and you're familiar enough with the software not to fumble around when, for example, you want to switch from the camera to a picture of your computer desktop. The more complicated your setup (switching between multiple cameras, using an external microphone instead of the built-in one, etc.), the more you should test and practice.

While it's important to make sure the technology works, don't overlook preparations for the course itself! Even if you have a lot of experience teaching classes in person, teaching over a video link is different enough that you should get some experience with some short, simple lessons before diving into a major course. Also recognize that the technology is still somewhat cutting edge, and occasional connection problems such as pauses, skips, and slightly unsynchronized picture and sound do occur. (It sometimes helps to disconnect and start over.)

I've barely touched on the subject here. I suspect that in coming months the American Association of Teachers of Esperanto and the *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* will devote increasing resources to live, on-line classes, since these obviously have some major advantages for teaching Esperanto. If you're not already a member of those organizations, note that joining AATE makes you a member of both for as little as \$20 per calendar year with electronic delivery of their publications. Membership with publications on paper is \$40 per calendar year. See <<http://aaie.us>> for more information. ★

enigma

Inter la solvintoj ni lotumos \$10-rabaton de la libroservo de E-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 17-a de julio**. (La adreso de la redakcio troviĝas en paĝo unu.) Bonŝancon! La ĉi-numera krucvorttenigmo nomiĝas *Langotordilo*, donante aludon al la stelmarkitaj solvoj.

Horizontale

- 1 Apartigil' interpunkcia
- 4 * Kverkonukso
- 9 Listfinanta mal-longigo
- 12 Malvira
- 13 * Fluas en ĝin river(et)o
- 14 Ide' konforma al la realo
- 15 Spaceto por iu en aviadilo, buso, ktp.
- 17 Moskeestro
- 19 Ceter'
- 20 Maldika, disk-forma bakaj'el pasto
- 21 Paperfoliet' sur kiu oni skribas noton
- 23 "____ pli peza ol fero, pli malpeza ol aero."
- 27 Kunligi ŝtofon per fadeno
- 29 Monstro Tolkien-a
- 30 Prefikso ambaŭsekse

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11
12				13						14		
15			16					17	18			
			19				20					
21	22				23	24					25	26
27				28		29					30	
31				32	33					34		
35				36				37	38			
39		40					41		42			
			43				44	45				
46	47					48					49	50
51				52	53					54		
55				56						57		

31 "___ faras ion, mono ĉion."

32 Preta esprimi ŝuldan senton

34 Mamul' kun grandaj kornoj el la nordokcidento

35 Mi + mi

36 Sterk'

37 Aldonos natrian kloridon

39 Hom' el la lando de RAGNARSSON kaj Björk

42 Virta alinomo de kantisto Paul David HEWSON

43 Kun angula mezuro egala al 90°

44 Malsupra Mezopotami'

46 Disigi, eble per hakilo

48 "Se vi volas filinon, _____ patrinon."

51 Surkovril'

52 * Ruband' kudrita al vesto, ekzemple uniformo, por ĝin ornamo

54 "Li taŭgas nek por studo, nek por ____o."

55 "Vivo" virtuala, kun avataroj

56 Foja rezult' de tro
longa pluvo

57 Unu, en Urbana

Vertikale

1 Ag' kiu principis
ranon?

2 "Al la buŝo de
'___' neniŭ povas
ordoni."

3 Sudeŭropa
ĉefurbo kiu en
1968 gastigis la
UK-on

4 Not' pri vorto
malofta

5 Bebrinkaĵo

6 "Por ĉiu ___
venas la tempo
por pago."

7 Ne, en Nov-
Zelando

8 "___ la
manon, sed
celas la panon."

9 "Ne ___o, sed
kvalito decidas
pri merito."

10 Afer' pri kio oni
parolas, skribas,
ktp.

11 ___ tio ("tial")

16 Malsan' infekta
kiu difektigas la
haŭton

18 Materikvanto

20 Manĝil'

21 Plene ekzameni

22 Eligis radiojn
videblajn

24 Diskforma

25 * Benjamin
FRANKLIN ne estus
elektinta ĝin
emblemo de
Usono

26 Ĝi diferencigas
disde viroj kaj
inoj

28 Starigi, trovi la
veran individue-
con de iu aŭ io

33 Pasia, fervora

34 "Ne kredu al
orelo, kredu
___."

36 Tag' iam nigra (en
oktobro 1929),
foje balota (en
novembro) kaj eĉ
dika (jus antaŭ
Karesmo).

38 Monaĥejestr',
por benediktanoj

40 * "___ dormado
ŝuldojn kresk-
igas."

41 Sinteza fibr', ofte
uzata en ŝtofo

45 Senatano PAUL
de Kentukio

46 Plena kred'

47 Malplezur' osceda

48 Seninterrompa
moviĝ', kiel akvo
en rivero

49 Nuna hejm' por
kelkaj golfpilkoj
de Alan SHEPARD

50 Daŭre

53 Membr'

Regional events

For a comprehensive list of events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu/2011.htm>>.

June 17 – 20 (Emeryville, CA)

59th National Conference, Esperanto-USA

This year's *Landa Kongreso* meets right on the San Francisco Bay, next to the impressive Bay Bridge. The theme is "Esperanto: the 'Other' Green Movement".

Although commonly associated with environmentalism, the idea of a green movement has been part of Esperanto for more than a century. Do these two "green" movements have shared interests? Or should Esperanto be just a language, without any social, cultural, or humanist ideals? Come discuss these topics with us in a region at the forefront of both



green movements! For more information, see <<http://esperanto.org/x/LKUS2011>>.

July 2 – 10 (San Diego, CA)

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

The famous North American Summer Esperanto Institute returns to beautiful UC San Diego in a new format. Using only four vacation days, it's ideal for those with limited vacation time and limited budgets! Daily classes with instructors Bertilo Wennergren (Sweden), Birke Dockhorn (Germany) and Lee Miller (USA), talks, games, excursions to local sights, and more! Scholarships are available. See <<http://esperanto.org/nask>>.

New in the E-USA bookstore



FABELOJ DE FRATOJ GRIMM 1

Tradukis Kabe. Voĉlegas Stano MARĈEK. Enhavas la rakontojn *Feliĉa Joĉjo*, *Haĉjo kaj Grenjo*, *La sep kapridoj*, *Reĝo rano kaj fera Henriko*. KD. 60 min. 2008. Slovaĵujo. **\$27.10**



DETLA GRAMATIKO DE ESPERANTO

Bertilo WENNERGREN
Malpli peza kaj komplika ol *PMEG*, tiu ĉi gramatiko estas (preskaŭ) same detala kaj utila. Mola bindaĵo. 217 p. 2010. **\$22.00**



FABELOJ DE ANDERSEN 1

Tradukis L. L. ZAMENHOF, Voĉlegas Stano MARĈEK. Enhavas rakontojn *Fajrilo*, *Malgranda Niko kaj granda Niko*, kaj *Reĝidino sur pizo*. KD. 62 min. 2008. Slovaĵujo. **\$27.10**

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530** or online at <http://esperanto-usa.org/retbutiko>.

More complete descriptions can be found online. If a title is out of stock, the online bookstore notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



Aboco estas malkutima libro – fare de aŭstraliaj infanoj kaj instruistino. La infanoj elektis la vortojn kaj faris la bildojn. La instruistino, kiu instruas kaj Esperanton kaj arton elektis la projekton por krei instruilon utilan ankaŭ por pli maljunaj lernantoj.

Instruistoj en Sidneo kaj Jakarta raportas ke *Aboco* allogas infanojn kaj instigas diskutadon pri Esperanto kaj lingvoj ĝenerale.

Aparta gvidilo por instruistoj estos baldaŭ senpage eŭŝutebla. Do, donu ekzempleron (kun gvidilon) al bazlernejo apud vi! Se

plaĉus al vi donaci la libron al afrika(j) lernejo(j), la eldonisto aranĝos tion kun Jérémie SABIYUMBVA, prezidanto de *Association Nationale d'Espéranto au Burundi*.

Aboco estas mendebla ĉe <http://mondeto.com>. Se via klubo volas aĉeti pakajon da 10 ekzempleroj – ĉu por familianoj, ĉu por lokaj bazlernejoj kaj infanzorgejoj, ĉu por la afrikanetoj – la kosto estas duono de la normala prezo! Ni komencu esperantigi la mondon per A, B, C... ĉu ne?
—Penny Vos, Aŭstralio